V-19642/15 (1946)



Laborista Esperantisto

15DE JAARGANG No. 5 – 4 MEI 1946
OPLAAG 3500 EXEMPLAREN PER MAAND
ABONNEMENT f 2.25 PER JAAR. LOSSE NUMMERS f 0.20. VOOR LEDEN GRATIS

Adres Redactie: Middenweg 226, Amsterdam (Oost). Administratie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: F. L. E. Postbus 8002 – Postgiro Amsterdam 111278.

ORGAAN VAN DE BOND VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN F.L.E.
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

NA ONS CONGRES



De oude gewoonte getrouw hielden wij arbeiders-esperantisten, wederom met Pasen, ons congres. Ditmaal was het Alkmaar, dat met onze afdeling Heilo de verre van gemakkelijke taak had, deze jaarlijkse bijeenkomst te organiseren. En van hun taak hebben zij zich naar behoren gekweten. Van Alkmaar begint de Victorie! En, peilen wij zo de stemming der congresbezoekers, dan geloven wij deze spreuk ook van toepassing op ons werk. Allen zijn weer bezield van hernieuwde werklust, ter verwezenlijking van ons ideaal: Esperanto zij ieders tweede taal.

Drie dagen lang leefden honderden afgevaardigden en bezoekers in de eigenaardige sfeer van, zouden we willen zeggen, het Esperantisme. De aanwezigheid van buitenlanders, arbeiders uit Denemarken en Zweden, uit Engeland, Frankrijk en België gaf ditmaal ons congres zelfs een internationaal tintje. En het deed ons deugd uit hun mond de vreugde te mogen vernemen, over de wijze waarop onze Nederlandse deelnemers, in discussies en in de conversatie, het Esperanto bleken te hanteren. Inderdaad, met welk een gemak leidde de voorzitter de vergaderingen en kweten afgevaardigden zich van hun taak, zich enkel en uitsluitend bedienend van de taal, die geen levende taal zou zijn, het Esperanto. Hoe zouden zij, die gewoon zijn internationale bijeenkomsten te bezoeken, zich hieraan hebben kunnen spiegelen! Hier een congres, dat al zijn zaken afdeed in één vreemde taal, de internationale taal, 't Esperanto. En in vele delen van de wereld, komt in verscheidene landen, het intellect bijeen en hoort maar verstaat niet! Tezelfdertijd komen duizenden jongeren tezamen en getuigen, dat zij „streven naar het hoogste, graven naar het diepste en willen de wereld omspannen met vriendschap". Deze jeugd die de toekomstige draagster is van ons maatschappelijk bestel, die de wereld zal moeten opbouwen en streven naar betere internationale verstandhouding, ook zij hoort, doch verstaat niet. Schoon is de leuze, de wereld te willen omspannen met vriendschap. Maar schoner nog de taal, welke de verwezenlijking dezer leuze mogelijk maakt. Een grote verantwoordelijkheid rust op hen die de jeugd leiden. Op hun schouders rust de taak, de jeugd op haar internationale werkzaamheid voor te bereiden. Willen het niet slechts ijdele woorden zijn, dan dient de basis gelegd te worden door de taal, de internationale verstaanbaarheid. Dat men zich daarop bezinne!

Meer dan ooit zal onze bond de arbeidersbeweging er van moeten doordringen, dat geen gezond internationalisme mogelijk is, zonder een internationale taal. Dat onze congressen het lichtend voorbeeld mogen zijn!

Moge ook de naamsverandering van Federatie in Bond, onder het devies „Fidu la Estontecon", waartoe het congres besloot, onze organisatie ten goede komen.

Toespraak van den burgemeester v. Alkmaar

Bij de officiële ontvangst van ons congres ten stadhuize sprak de burgemeester ons als volgt toe:

Dames en Heren,

Het is mij een groot genoegen de Federatie van arbeiders-esperantisten hier namens het gemeentebestuur van Alkmaar te ontvangen. In het bijzonder wil ik ook de buitenlandse deelnemers aan uw congres van harte welkom heten.

Op allerlei gebied worden oude banden, die tijdens de oorlog verbroken waren weer aangehaald. 1946 is voor de Federatie, die in 1911 werd opgericht een jubileumjaar en bij deze gelegenheid wil ik haar dan ook van harte gelukwensen met haar 35-jarig bestaan. Moge zij spoedig weer evenveel leden tellen als voor de oorlog. Iedere beweging die de verbreiding van het humanisme voorstond werd door den bezetter ontbonden. Ook uw organisatie zal daar niet aan zijn ontkomen. Uw doelstelling is het Esperanto onder de arbeidersklasse te verbreiden, die immers bij haar streven naar betere levensvoorwaarden sterk belemmerd wordt door het taalverschil. Thans wil ik minister Drees, erevoorzitter van uw congres, citeren, die zegt, dat Esperanto voor de overbrugging van het taalverschil uitnemend geschikt is door haar logische stelselmatige structuur en grote eenvoud, die het een ieder mogelijk maken zijn gedachten en gevoelens nauwkeurig en voor iedereen begrijpelijk uit te drukken. Voor het bereiken van uw doel, Esperanto in alle lagen der bevolking te doen doordringen zal uw congres zeer bevorderlijk en vooral ook zeer leerzaam zijn. Een directe gedachtewisseling komt de beheersing van de taal uiteraard zeer ten goede.

Nadat de burgemeester nog gewezen had op de verschillende bezienswaar-

(Vervolg pag. 2 onderaan)

Toespraak tot den Burgemeester van Alkmaar

(DOOR DEN VOORZITTER VAN HET CONGRES)

In naam van de Federatie van Arbeidersesperantisten in het gebied van de Nederlandse taal, dank ik u voor de hartelijke woorden, waarmee u ons congres hebt welkom geheten.
Het is ons eerste volledige congres na de bevrijding; een samenkomst, waarin we evenals elk jaar vóór de oorlog wederom getuigenis zullen afleggen van ons idealisme, van onze hoop op wereldvrede en broederschap, waartoe het Esperanto veel, zeer veel kan bijdragen.
Want hoewel de oorlog is afgelopen, is de vrede nog niet gewonnen, en wij esperantisten willen bij de wederopbouw van de wereld helpen de vrede te verwezenlijken, door de volkeren nader tot elkander te brengen.
Niet alleen de esperantisten willen dat. Er zijn ook anderen, die met dezelfde wens bezield zijn. En evenals wij voelen zij, dat het taalverschil daarvoor een groot beletsel is.
Maar in tegenstelling tot ons, wensen zij, dat een der nationale talen als wereldhulptaal dienst zal doen, doch over de keuze van die taal kunnen zij het niet eens worden. Men mag het in deze hoek van Europa vanzelfsprekend vinden, dat daarvoor het Engels gekozen wordt, — in Midden- en Zuid-Oost Europa geeft men de voorkeur aan het Russisch, dat met name in Tsjechoslowakije onlangs als verplicht leervak op de scholen is ingevoerd.
Doch met de keuze van een nationale taal zijn nationale gevoelens en de nationale cultuur verbonden, die niet door elk volk met sympathie worden begroet....
Dr. Zamenhof heeft dan ook begrepen, dat geen der nationale talen als wereldhulptaal in aanmerking kan komen, en hij schiep het Esperanto, dat door zijn eenvoud, welluidendheid en mogelijkheden een geniaal werk mag worden genoemd, dat bij taalgeleerden van naam grote bewondering heeft gewekt.
Geboren uit een hartstochtelijk verlangen naar vrede en broederschap onder de volken, heeft deze taal een cultuur meegekregen, die haar juist zo geschikt maakt voor het doel, dat haar schepper voor ogen stond, een cultuur, die minder in woorden kan worden weergegeven, dan wel innerlijk kan worden beleefd.
Wij zijn ons bewust, dat verschil in taal niet de enige scheiding vormt tussen de volkeren.
De grondslagen, waarop de huidige samenleving is gevestigd, vertonen nog vele andere gebreken. Maar wij zijn er van overtuigd, dat deze taal, op onze scholen ingevoerd, althans een goede verstandhouding tussen de volkeren kan bevorderen.
Daarom is het noodzakelijk, voor het denkbeeld „Esperanto-op-de-scholen" de overheid te interesseren. Het is ons dan ook een groot genoegen ter gelegenheid van ons congres belangstelling te mogen ondervinden van het gemeentebestuur van Alkmaar, hetgeen ons doet vertrouwen, dat te zijner tijd een beroep op uw college betreffende deze aangelegenheid in ernstige overweging zal worden genomen.
U hebt ons echter ook uw medewerking verleend: door de thans heersende zalennood waren wij bijna gedwongen elders te congresseren met alle gevolgen van een te korte voorbereiding. Uw tussenkomst heeft ons congres, dat het erevoorzitterschap geniet van Zijne Exc. Minister Drees, in uw stad mogelijk gemaakt. Een morele steun die wij zeer op prijs stellen.

(Vervolg van pag. 1).
digheden van oud en nieuw Alkmaar, eindigde hij zijn rede aldus:
Moge dit congres in belangrijke mate bijdragen tot het verdwijnen van de taalobstakels en scheidslijnen tussen de volkeren.

Met alle respect

In de bijlage van „De Vrije Socialist" van 9 Maart verscheen een uitvoerig pleidooi voor Esperanto van de hand van F. v. d. G. In een zeer lezenswaardig gedocumenteerd betoog komt de schrijver tot de conclusie:

> „Ik ken geen enkel blad of organisatie het recht toe, een strijdster te zijn voor socialisme en menselijkheid, die een wereldtaal als Esperanto steeds hardnekkig negeert."

Merkwaardig is hierop het antwoord van de redactie, dat we onze lezers niet willen onthouden.

> „Wij hebben natuurlijk alle respect en waardering voor de goede bedoelingen der Esperantisten. Maar zij hebben er ons tot dusver niet van kunnen overtuigen, dat de invoering van een levende taal als wereldtaal niet de voorkeur verdient boven Esperanto. Het Frans, waarvan honderden woorden, zuiver of verbasterd, reeds door alle talen zijn vermengd, schijnt ons daartoe het meest geschikt."

Het zou misschien niet ondienstig zijn voor genoemde redactie om zich het pleidooi te herinneren, dat Dr. Bolkestein b.v. voor het Engels meende te moeten voeren. En met alle waardering voor de goede bedoelingen zouden wij het toch meer op prijs stellen indien zij daadwerkelijk pogingen in het werk stelde om het Frans als wereldtaal te doen aanvaarden. Zolang zij dat niet doet, nemen wij aan, dat zij zich ten opzichte van dit vraagstuk nog geen volledig denkbeeld heeft gevormd. Ja, wij vragen ons in gemoede af, of genoemde redactie zich wel eens de moeite heeft getroost. om nader met het Esperanto (ook als levende taal) kennis te maken. Sluit de redactie haar ogen voor de uit-den-treure herhaalde argumenten, die aangevoerd worden tegen de mening, dat een nationale taal als wereldtaal zou kunnen worden aanvaard? Zo nee, dan lijkt het ons de juiste geste van deze redactie, om hierover een discussie in de kolommen van haar blad te openen. Wij zijn gaarne bereid hieraan mede te werken. X.

KONSTRUŜTONOJ

Instrua.

La kongreso je pasko 1946a en Alkmaro estis grava por la nederlanda laborista esperanto-movado, sed ankaŭ por la eksterlanda. Kvankam ĝi estis kongreso de nia nederlanda asocio, ĝi aspektis internacia. Ĉu ne partoprenis ĝin kamaradoj el Anglio, Francio, Danio, Svedio kaj Flandrio? Estis la unua fojo en la historio de nia asocio, ke ĝi invitis alilandajn L.E.A.-ojn reprezentiĝi sin en nia kongreso kaj tiu faro montriĝas ripetinda, ĉar kiom riĉinstrua ĝi ja estis!
La eksterlandaj gastoj lernis multe dum sia vizito, sed ni ne malpli ol ili. Post la kongreso ili rakontis al ni, kiom multe ili spertis tiel pri la praktika uzado de la lingvo, kiel pri organizaj aferoj.
Mire la eksterlandaj gastoj aŭskultis, komence nekomprenante la por ili ankoraŭ nekonatan aferon, ke pli ol kvincent samlandanoj dum tri tagoj forgesas sian lingvon gepatran kaj pensas kaj parolas en lingvo tutmonda. En iliaj landoj oni ne tiel persiste aplikas Esperanton, estante inter si kiel en nia nederlanda laborista esperanto-movado. Per nia ekzemplo ili instruiĝis, ke la ekskluziva uzado de Esperanto estas la nura metodo por lerni paroli la lingvon, kvazaŭ oni jam konas ĝin de la tempo kiam oni eligis la unuajn sonojn.
Reciproke la ĉeesto de niaj eksterlandaj gastoj estis instrua por ni. Esperanto ja estas tutmonda afero, sed bedaŭrinde multaj nederlandaj amikoj evidente ankoraŭ ne sufiĉe konvinkiĝas pri tiu simplaĵo. Ili uzas la lingvon, eĉ fervore uzas ĝin, sed nur inter la limoj de sia malgranda lando; ili estas, ho stranga kontraŭaĵo, naciaj Esperantistoj!
La ĉeesto de niaj kamaradoj el aliaj landoj en nia kongreso denove akcentis la tutmondecon de nia lingvo. Ke pro ilia vizito malfermiĝu la okuloj de la naciaj Esperantistoj! H. Sch.

RADIO HILVERSUM II

Ondolongo 415 m.

Kdo G. J. Degenkamp parolos pri la Esperanto-literaturo post la milito. La elsendo okazos la 25an de Majo je la 14a ĝis 14.15 a.h. M.E.T.
Raportu al: V.A.R.A. Hilversum, Nederlando.

EXAMEN DOEN

De eerstvolgende examens vinden plaats op:

Zaterdag 22 Juni te Eindhoven (aanmelden tot 11 Mei).

Zaterdag 13 Juli te Deventer (aanmelden tot 1 Juni).

Aanmelding schriftelijk bij de secretaresse-penningmeesteresse H. M. Mulder, Zilvermeeuwstraat 29, Badhoevedorp.

Prospectus gratis bij uw afdelingsbestuur of bij de Libro-Servo F.L.E. Postbus 8002, Amsterdam-W.

Raporto pri la 27a kongreso, okazinta dum Pasko en Alkmaar

MALFERMA PAROLADO DE LA KONGRESPREZIDANTO

KARAJ GEKAMARADOJ,

En la nomo de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlan la lingvo mi kore salutas vin en nia 27a kongreso, kiu ĝuas la honaran prezidantecon de Lia Ekscelenco ministro Drees, esperantisto kaj varma defendanto de nia afero kaj membro de nia organizo. Ĉar Lia Ekscelenco ne trovis okazon viziti nian kongreson kaj paroli al ni, li kompense verkis artikolon en „Laborista Esperantisto", kiun vi sendube jam legis. Aparte mi salutas k-don Piron el Parizo, reprezentanton de la Plenumkomitato de S.A.T. kaj de „S.A.T.-amikaro", la franca L.E.A., kiu hodiaŭ kongresas en Nancy.
Plie mi salutas k-don Rosenbloom el Manchester, reprezentanton de „S.A.T. en Britio", k-don Brown el Londono, reprezentanton de la Londona Laborista Esperantista Klubo, kaj k-don Holger Hansen, prezidanton de Dana, kaj k-don Gunar Rosell, prezidanton de la Sveda Laborista Esperantista Asocio.
Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne sukcesis inviti ankaŭ fidelan germanan kamaradon.

(Al la gastoj):
Kamaradoj ni tre ĝojas, ke vi akceptis nian inviton, ĉar per via ĉeesto vi ne nur akcentas la internacian karakteron de nia movado, sed ankaŭ reciprokas nian deziron por pli firma kaj pli vasta internacia kunlaboro en la kadro de S.A.T.
Al k-doj Holger Hansen kaj Gunar Rosell mi volas direkti ankaŭ kelkajn specialajn vortojn.
Ni vin invitis ankaŭ, por ke ni havu okazon, *persone* esprimi pere de vi al la dana kaj sveda esperantistaroj niajn sentojn de profunda danko por ĉio, kion ili faris por ni post la terura milito-vintro, kiun ni travivis.
Per tiu maniero Esperanto brile plenumis sian interhelpan mision, kaj mi estas certa, ke nia Majstro, se li ankoraŭ estus vivanta, spertus per ĉi tiu praktika ekzemplo la plej belan momenton de sia vivo.
(Donante al ili la manon):
Ni ĝojas, ke ni povas premi al vi la manojn; mi sendube parolas en la nomo de ĉiuj esperantistoj nederlandaj, petante al vi transdoni nian dankon al la danaj kaj svedaj esperantistoj, kiam vi estos revenintaj en viaj respektivaj landoj.
(Aplaŭdo).
Fine mi salutas la reprezentanton de „La Estonto Estas Nia".

Karaj gekamaradoj,
Kvankam nia federacio kongresis jam en oktobro pasinta, ĉi tiu kongreso estas post la liberiĝo la unua, en kiu ni kunvenas laŭ la kara, tradicia maniero. En oktobro ĉeestis nur la delegitoj, en salono tro malgranda por doni lokon ankaŭ al la ordinaraj gasto-membroj. La tiaman kongreson ni nomis *labor-kongreso*, ne pro tio, ke ni ordinare *ne* laboras en niaj kongresoj, sed tial, ke ĝi ne prezentis tiujn aranĝojn, kiuj faras la vojaĝon al la kongres-urbo kvazaŭ pilgrimado kaj la kongreson mem laborist-esperantista festo.
Sed ĉi foje tian feston ni travivas denove. Post kvin nigraj jaroj ni denove kunvenas en libero kaj kamaradeca sfero por diskuti la manieron kaj la rimedojn per kiuj ni daŭrigu nian laboron: la rekonstruon de nia movado kaj la pli intensan disvastigadon de Esperanto inter laboristoj.
Grandan meriton pri la aranĝo de la nuna kongreso havas la Organiza Komitato, el sekcioj Alkmaar kaj Heilo, kiu en minimumo da tempo, fakte en nur kelkaj monatoj, sukcesis plej grandajn admiron, respekton kaj dankon.
Dankon ni esprimas ankaŭ al la poŝtistoj, kiuj hieraŭ faris nian procesion al la urba domo, impresa propaganda manifestacio.
Sed ombro malheligas la sunon super nia kunveno: nia prezidanto, k-do Veen, malsaniĝis kaj sekve ne povas ĉeesti. Kion tio signifas por li, povas kompreni ĉiu, kiu scias, kun kiom da zorgo kaj fervoro li preparis la nunan kongreson. Ni estas certaj, ke dum ĉi tiuj tagoj liaj pensoj senĉese estas kun ni. Ankaŭ k-do van de Graaf, la diligenta sekretario de la Organiza Kongresa Komitato, malsaniĝis kaj same ne povas vidi la rezultaton de sia laboro.

Pasko — Renaskiĝo — Rekonstruo, tekstas la devizo, kiun la Organiza Kongresa Komitato donis al nia 27a kongreso.
Multon materian la malamiko detruis en Nederlando kaj Flandrio, sed unu aferon li ne sukcesis detrui, nek subigi: nian spiriton! Tion pruvas ankaŭ nia Federacio. Ĝi estis la unua Esperanto-organizo, kiu reviviĝis post la liberiĝo. Miriga, eĉ por nia estraro, estis la tuja reago de niaj membroj post ricevo de nia alvoko, kiu, presita dum la milito, tuj je la 5a de majo estis forsendata. Pro malbonaj poŝtaj rilatoj ni akiris nur longan tempon poste kontakton en Flandrio; nun ĉeestas nian kongreson la delegitino, k-dino Corry de Cock, kiun mi kore bonvenigas.
Iom post iom nia movado restariĝas. Hodiaŭ mi povas komuniki al vi, ke la Federacio nombras 2536 membrojn kaj 81 sekciojn.
Pri tio ni ĝojas, tamen ne multe: ni konstatas, ke ni perdis parton de nia tereno: ni reakiris 50% de nia membro-nombro el la jaro 1938a. En tiu jaro nia organizo nombris 5027. En la aliaj Esperanto-organizoj en Nederlando la situacio estas sama: ankaŭ ili perdis 50%
La ve-ajn idealistojn, kiuj povas spirite memstare vivi, la milito ne tuŝis. Ili atendis la signalon por tuj rekomenci la laboron sed la malpli fortaj gefratoj seniluziiĝis, indiferentiĝis, aŭ perdis sian entuziasmon kaj kredon kaj sian spiritan subtenon. Aliaj ankoraŭ ne retrovis sian ekvilibron aŭ ankoraŭ ne venkis sian inertecon, en kiun la milito ĵetis ilin.
Tiu spirita stato ankoraŭ influas la internan vivon de diversaj niaj sekcioj, malgraŭ la fakto, ke okazas multaj kursoj kaj vendiĝis pli ol 4000 elementaj lernolibroj kaj centoj da aliaj instruiloj.
Al ni la tasko veki tiujn membrojn el ilia letargio, inspiri al ili novan esperon, redoni al ili ilian vivocelon.

Honoro al la mortintoj

Ankaŭ la morto forrabis al ni fervorajn membrojn. Plurajn ni jam rememorigis en nia lasta kongreso, sed dume ni devis ĉizi sur la funebra kolono ngvajn nomojn, kiujn mi nun legos al vi. Mi petas al vi, honore al tiuj membroj leviĝi de viaj seĝoj:
K-do Brinks, sekretario de sekcio Deventer, mortis en Germanio.
K-do Manheim, ano de sekcio Rotterdam 2a mortis en gas-ekstermejo kun sia tuta 5-persona familio.
K-do van der Tas, ano de sekcio Amsterdam 10a.
K-do Wijnman, aktiva ano de distrikto Hago, mortis en koncentrejo en Germanio.
K-do Klompien, ano de sekcio Amsterdam 1a, mortis en koncentrejo Mauthausen en Germanio.
K-do Luiten, ano de sekcio Hago, mortis okaze de la batalo sur Java-maro en 1942.
Krome multaj judaj membroj ĝis nun ne revenis, kaj tre verŝajne ill pereis. Iliaj nomoj estas i.a.:
K-dinoj v. Wezel kaj *Tertaas.*
Gekamaradoj Gans.
K-doj Aronius, Tertaas, Polak, van Praag, Mutsemaker, Cardozo, Gobitz, Pinto, Lopez Dias, A. de Vries, Mozes.
Ni rememoru ankaŭ kvar aliajn fidelajn membrojn, nome:
K-don Goemans, 2an prezidanton de sekcio Amsterdam 4a, kiu mortis post kelkmonata malsano.
K-don Worst, anon de sekcio Hago kaj estraranon de la Haga distrikto, subite mortintan pro kormalsano.
K-don Zweistra, anon de sekcio Rotterdam Va, kaj
K-don Post, anon de sekcio Delft.
Ni daŭrigu ilian laboron ĝis la fina Venko. *(Oni eksidas).*

Gekamaradoj,

Kiel ajn mizeraj estis la kvin jaroj da milito por nia lingva regiono, ili ankaŭ estis instruaj por ni. Jam dum la okupado oni komencis kompreni, ke se ni volas starigi homindan socion, ni devas formeti de ni ĉion bagatelan kaj neprincipan, kio malebligas harmonian kunlaboradon. La Federacia estraro atentis tiun inklinon, kiu estiĝis ankaŭ en nia movado. Ankaŭ ĉi tie sentiĝis la deziro pri unueco, ankaŭ ĉi tie oni deziris, ke malaperu la antagonismo inter la diversaj organizoj, kaj precipe oni deziris kontentigan solvon de la ekzamena problemo, kiu treniĝis jam 15 jarojn.

Unueco.

Necesas, ke mi iom detale pritraktu ĉi tiun deziron pri unueco kaj ĝian efektivigon, ĉar tie kaj tie, ankaŭ internacie, regas pri ĝi kelka miskompreno.
La deziro pri unueco en nia movado estas preskaŭ tiom malnova, kiom Esperanto mem kaj vivas pli-malpli latente ĉiuj esperantistoj. Ĝi baziĝas sur la idealo de D-ro. Zamenhof.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento,
Unu grandan rondon familian.

Dum preskaŭ 60 jaroj tiuj vortoj korpigis la idealon de Esperanto kaj allogis milojn da homoj-kun-bona-volo partopreni la batalon por nia sankta afero. Tiuj vortoj reprezentas ideon, kiu nedisigeble estas ligita al Esperanto kaj konsistigas ĝian kulturon, vole — ne vole absorbatan de ĉiu, kiu lernas la lingvon.
Jen, per kio Esperanto superas la lingvojn naciajn, kiujn oni nuntempe propagandas kiel lingvojn tutmondajn: neniu lingvo nacia per si mem kapablas inspiri al la homoj la noblan idealon, kiu instigis nian Majstron krei Esperanton kaj kiu fariĝis la animo de lia lingvo.
La uzo de lingvo nacia en internaciaj rilatoj havas por la uzantoj tute alian karakteron ol por la samaj rilatoj la uzado de Esperanto. Ĉar ĉe apliko de nacia lingvo la anglo ja restas por ni anglo, la franco — franco, la ruso — ruso k.t.p. Sed aplikante Esperanton oni sentas, ke okazas io alia: „dissaltas la obstinaj baroj inter la popoloj dividitaj...." limoj malaperas.... okazas interfratiĝo....
Sufiĉa kialo, oni dirus, por ke ĉiuj esperantistoj organizu sin en unu asocion.
Sed ĉe niaj klopodoj por atingi tian staton de egaleco kaj frateco la praktiko haltigas nin antaŭ la malvarma, ĉiutaga reala vivo kun ĝiaj multnombraj bariloj kaj disigiloj. Tion spertis ankaŭ D-ro Zamenhof, kiu komence kredis, ke, se la homoj nur komprenos unu la alian, estiĝos paco sur la tero. Sed tiam li estis ankoraŭ knabo. Poste li vidis, ke ne nur muroj lingvaj tenas la homojn disigitaj, kaj li dediĉis sin al klopodoj forigi alian muron: la religian diversecon. Li fondis la homaranismon, ponton inter la diversaj religioj, kiun li ankaŭ aludis en la malmulte konata sesa strofo de „La Preĝo sub la verda Standardo":

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj....
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mohametanoj,
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.

Sed ĝi ne trovis multajn adeptojn, kaj tro frue Zamenhof forlasis la mondon, ol ke li

povus okupi sin pri klopodoj detrui ankaŭ aliajn murojn inter la homoj, se tio estus lia intenco.
Li postlasis al ni nur sian kredon pri tutmonda frateco pere de neŭtrala lingvo internacia, la kredon el siaj junulaj jaroj, sed kiun, malgraŭ ĝia naiveco por la nuna tempo, ni ne povas ekzili el nia koro, misteran kredon; kiu spite al sia nuna nesufiĉo, spite al sia nebuleco instigas kaj entuziasmigas nin, kredon, kiu igas nin forgesi por mallonga tempo ĉion, kio disigas nin, por kune ĝui bonfaran varmon sub la radioj de la verda stelo.
Por mallonga tempo — mi bedaŭrinde devas ripeti — ĉar la praktiko baldaŭ vekos nin el nia revo kaj vokos nin al la realo. Kvazaŭ moke ĝi starigas nin antaŭ murojn ankoraŭ nedetruitajn kaj provizore ne detrueblajn, murojn, kiuj disigas nin laŭ ideologio, laŭ klaso, laŭ socia rango, laŭ materia bonstato.
Multjara sperto instruis nin, ke ne eblas, kunigi sur bazo de egalrajteco ĉiujn tiujn diversajn specojn de homoj — kiom ajn bonvolaj ili cetere estas — en la pli malpli, familiara vivo de niaj esperantistaj rondoj. Frue-malfrue la konscio pri tiuj diferencoj trarompiĝos; anoj de la samaj ideologio, socia rango, klaso kaj materia bonstato ne malofte apartiĝas sin de la ceteraj. La interna ideo, tiom ofte laŭde kantata, ĝenerale montriĝas en la praktiko nekapabla plene transponti tiujn diferencojn.
El idealista vidpunktô — „ĉiuj homoj iĝu fratoj" — oni devas bedaŭri tion, sed ni estas praktikaj idealistoj, kiuj kalkulas pri la reala vivo.
El la agnosko de tiu realeco naskiĝis la laborista esperanto-movado, naskiĝis ankaŭ nia Federacio. Ni organizis nin aparte, por propagandi kaj instrui Esperanton inter laboristoj, kio estas laboro, kiun neniu alia organizo povas plenumi tiom bone kiom ni mem, same kiel ekz. katolikoj povas propagandi kaj instrui Esperanton en siaj rondoj pli bone ol ni, socialistoj. Kaj kiu povus pli bone propagandi la praktikan uzadon de Esperanto por la idealoj de la laborista movado ol ĝuste la laboristoj mem?
Dume ni ne ĉesas esperi pri senkapitalisma kaj senklasa, paca socio, en kiu ne plu estos klasbatalo kaj en kiu oni estimos la laboron kaj la laboriston, kaj en kiu la fina idealo de D-ro Zamenhof, la revo el liaj junulaj jaroj „por eterna ben, efektiviĝos".
Sed provizore ni agos, kiel la realo postulas de ni: ni prilaboros nian propan terenon!

Ĉe tio ni bone konscias, ke tia unuflanka propagando ne sufiĉas. Nia idealo ja estas: Esperanto — dua lingvo por ĉiuj! Por atingi tion ni nepre atentu la ĝeneralan propagandon kaj por tio necesas, ke ĉiuj kaj ĉiaj esperantistoj unuiĝu. Sed per kia maniero? Ĉu per *kunfandiĝo* de niaj organizoj aŭ per ***kunlaborado inter*** la organizoj?
Vi jam povas konkludi mian respondon:
La Federacia estraro preferis la lastan. Ĉar tro intima kunlaboro kun alikarakteraj samcelanoj kondukas al malfortiĝo de la t.n. „faka" — en tiu ĉi okazo laborista — movado kaj mi aŭdacas antaŭdiri al niaj francaj kamaradoj, kiuj kunfandiĝis kun la neŭtralaj kaj katolikaj esperantistoj, ke ilia origina celo ne havos longan vivon. La laboro por Esperanto inter laboristoj povas esti farata nur de la laboristoj mem!

Mi ripetas:

Tial la federacia estraro proponis en la pasinta kongreso „fondi kontaktkomitaton, en kunlaboro kun la tri aliaj esperanto-organizoj, kiu komitato en okazo de bezono povu reprezenti la esperantan movadon en nia lando".
Jam antaŭ la fino de la pasinta jaro tiu propono efektiviĝis: kun L.E.E.N., N.K. kaj N.C.E.V. ni fondis la Nederlandan Centran Komitaton Esperantistan, nederlandlingve: Centraal Comité van de Esperanto-beweging in Nederland.
En sia apenaŭ kvarmonata ekzistado tiu komitato jam faris bonan laboron. Ĝia unua sukceso estas la atingo de unueco en la ekzamena afero sur la bazo de egalrajteco. De la 1a de januaro ĉi jare ekzistas nur unu Ekzamena Komitato, en kiu la kvar organizoj estas reprezentataj de po 3 anoj.
La dua decido estas la fondo de komisiono por Esperanto-muzeo en Nederlando. Ĝia tasko estas „kolekti kaj konservi ĉiujn esperantaĵojn, precipe historie gravajn koncerne la movadon tutmondan kaj aparte la movadon nederlandan, kaj laŭeble ekspozicii ilin por efiki informe kaj propagande al la ne-esperantista publiko kaj historie-instrue al la esperantistoj", laŭ la priskribo de k-do de Bruin, kiu estis petata esti ĝia sekretario.
La tria decido estas: aranĝi komunan tutlandan Esperanto-Kongreson, okazontan en la komenco de l' Verda Monato en Utreĥto. Ĉi tiu kongreso devas fariĝi granda, ĝenerala propaganda manifestacio, kiu preparu la teron por la aparta laboro de ĉiu organizo.

Gekamaradoj, la Centra Komitato jam marŝas kaj vi nun certe komprenas, ke por neniu esperantisto ekzistas plu motivo aŭ preteksto resti ekster la organizita movado. Celadi unuecon per loka grupo ne aliĝinta al iu tutlanda organizo, ne havas sencon. Oni komprenu, ke rigora unueco estas necesa en sindikatoj, sed ne prudenta en la movado esperanta. La disvastigon de Esperanto ni servas pli bone, se ĉiu organizo prilaboras sian propran terenon, kaj ĉiuj kune, en la Centra Komitato, la ĝeneralan.
Tial mi alvokas trans ĉi tiun kongreson ĉiujn izolajn esperantistojn kaj grupojn de esperantistoj aliĝi al tiu el la kvar Nederlandaj Esperanto-asocioj, al kiu ili sentas sin plej proksimaj. Per tio oni plifortigos ne nur la koncernan asocion, sed ankaŭ la tutan agadpovon de la Nederlanda Esperanto-movado.

La internacia tereno.
Similan kunlaboron ni deziras ankaŭ sur tereno *internacia*. La Organizo de la Unuiĝitaj nacioj prezentas kvazaŭ tutmondan registaron, al kiu ni povus turni nin por proponi la enkondukon de Esperanto kiel internacian lingvon.
La deklaro de S-ino Roosevelt, ke ŝi volas proponi al la Unuiĝitaj Nacioj, ke ĉiu infano, kie ajn en la mondo, lernu krom sian gepatran lingvon ankaŭ duan lingvon, kiu sur la tuta mondo estu la sama, instigu nin, esperantistoj, esti aktivaj.
Ĉar tuj prezentas sin la demando: kiun lingvon oni devus elekti? La pensoj de naciemaj homoj ĉiam direktiĝas al lingvo *nacia*. En okcidenta Eŭropo oni fervore propagandas la anglan lingvon, ĉu en ĝia natura ĉu en ĝia kripligita formo „Basic English". En la centra kaj orienta partoj de Eŭropo, kie regas la influo de Sovetio, oni propagandas la rusan. En Ĉeĥoslovakio oni enkondukis la rusan lingvon en la lernejojn eĉ kiel devigan fakon. En tiu kaj aliaj slavaj landoj la germana lingvo perdis sian terenon kaj la tieaj popoloj ne estas sufiĉe anglemaj aŭ francemaj por akcepti la anglan au la francan lingvon kiel lingvon internacian. La milito postlasis ja vundojn ŝajne ne kuraceblajn....
Por Suda Ameriko oni propagandas la hispanan, por Indonesio kaj ĉirkaŭaĵoj la malajan.
Kaj kvazaŭ tio ne sufiĉus por konfuzi la publikon, la Internacia Helplingva Instituto en Nov. Jorko, I.A.L.A. surprizis nin en sia raporto aperinta en la pasinta aŭtuno, per eĉ *tri* projektoj de artefaritaj lingvoj samtempe, kiuj, estante nur revarmigitaj projektoj *Novial*, *Occidental* kaj *Latine sine flexione* prezentas nenion novan. Ili turnas sin ĉefe al la scienculoj, ne al la ordinara popolo. Ne necesas esti profeto por antaŭdiri, ke tiuj projektoj, eĉ se ili dum kelka tempo altiros la atenton de la publiko, iros la vojon de ĉiuj tiaj projektoj, nome al la forgesujo.... Ilia sola efiko estas dumtempa malutilo al la mondlingva afero ĝenerale kaj al Esperanto aparte.
La sorto de ĉi tiuj klopodoj por enkonduki nacian aŭ novan artefaritan lingvon kiel lingvon internacian pruvas, kiom ĝusta estis la vizio de D-ro Zamenhof kaj kiom aktuala ankoraŭ estas lia genia artikolo „Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia". Pasis post ĝia apero preskaŭ 50 jaroj, en kiu tempo Esperanto pruvis sian uzeblecon en ĉiuj cirkonstancoj de la vivo. Ĝi kontentigas la plej malvarman intelekton same kiel la plej pasian koron. Ĝi montriĝis lingvo kun animo kaj kulturo, kiu tute konformiĝas al sia celo: esti ligilo inter plej diversaj popoloj. Sed ankoraŭ regas pri ĝi granda nescio kaj multaj antaŭjuĝoj. Al ni, esperantistoj, la tasko venki ilin per sistema kaj persista informado. Ankaŭ *inter*nacie ni devas atesti pri la vivanteco kaj parola, skriba, literatura, scienca kaj teĥnika uzebleco de nia lingvo, por akceptigi ĝin lingvo internacia.
Tio postulas kunigon de fortoj per la sama maniero kiel ni faris tion en nia lando, nome per la fondo de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-movado, en kiu sur la demokrata bazo de egalrajteco estu reprezentataj la naciaj, internaciaj aŭ sennaciaj neŭtralaj kaj t.n. „fakaj" organizoj. La neŭtralaj organizoj ne plu rigardu la laboristajn, katolikajn kaj kristanajn organizojn akcesoraj, nek ĉi tiuj rigardu la neŭtralan movadon la oficiala kaj gvida instanco. Ni ne deziras superregi la movadon, nek deziras esti superregataj.
La amplekso de internacia por-esperanta laboro praviĝas la fondon de permanenta komitato. La lingva problemo neniam havis tiom da atento de la publiko ol nun, kiam tutaj popoloj interskuiĝis kaj multaj homoj dolore spertas la ĝenon de la diverslingveco. Mi estas tiom optimisma, ke mi kuraĝas diri, ke por Esperanto malfermiĝas glora perspektivo. Sed ĝia venko ne venas sen nia fervora agado. Ni devas streĉi ĉiujn niajn fortojn kaj persisti en nia penado.
Ankaŭ en niaj propraj rondoj necesas pli granda aktiveco. Ne estas bone, ke nur en la regiono de la Nederlanda lingvo ekzistas granda laborist-esperantista organizo. Necesas, ke ekfunkciu la L.E.A.-komitato, aprobita en la 19a S.A.T.-kongreso en Kopenhago, kiel interhelpa instanco por la por-esperanta laboro de la landaj laboristaj Esperanto-asocioj.

Propagando.

Tiel en la tutmonda propaganda maŝino unu dentrado kaptos la alian kaj regule funkciigos ĝin.
Sur la kampo de radio-elsendoj esperantaj diversaj landoj jam aktiviĝis.
Regulaj elsendoj okazas de el: Berno, Svedio. Lyon, Kortrijk. Racine (Usono), Brailo. Praha, Moravska Ostrava, Varsovio, Sofio, Aŭstralio.
Baldaŭ komencos la hungara sendstacio aranĝi esperantajn prelegojn kaj informojn. Kiel nun statas la eblo pri esperantaj elsendoj en Nederlando? Pri tio ni povas noti konsiderindan sukceson. Tuj post la reveno de la Laborista Radio Asocio en la eteron, la federacia estraro estis turnonta sin al ĝi, kiam V.A.R.A. mem jam petis al ĝi sendi parolonton por elsendo pri Esperanto je la 9a de februaro pasinta. Tiun tagon nia prezidanto paroladis pri „Esperanto je la servo de la pacideo". V.A.R.A. ricevis pri tiu elsendo multe da dankleteroj, en kiuj oni petis daŭrigi. Tiu agado de la publiko multe subtenis la federacian estraron, kiam ĝi poste petis regulajn elsendojn. V.A.R.A. interkonsentis kun ni pri kvarronhoraj elsendoj ĉiukvarsemajne je sabato de la 2—2.15, komence de la 27a de aprilo.
Pri la kunlaboro de la gazetaro ni ne povas esti tiom kontentaj. En tiu fako ni perdis preskaŭ nian tutan terenon. La redakcioj ĝenerale enamiĝis en la anglan lingvon kaj esprimas la ordinarajn banalaĵojn pri Esperanto, kvazaŭ ne jam pasis 60 jaroj da propagando. Nur kelkaj gazetoj enpresigas iufoje niajn sciigojn. Varman kunlaboradon de iu redakcio mem ni renkontas preskaŭ nenie. Mi esceptas „De Vrije Alkmaarder", kiu okaze de nia kongreso dediĉis preskaŭ tutan numeron al nia kongreso.

(Aplaŭdo).

Necesas sistema organizado de nia gazetarservo kaj sistema propagando ĉe la redakcioj el kiuj kelkaj skribis al ni, ke ili „ekstudas la aferon". Ilia nescio pri Esperanto kaj ĝia literaturo estas konsterna.
La fed. estraro atentas ĉi tiun flankon de nia propagando kaj esperas baldaŭ organizi kun niaj sekcioj sisteman prilaboradon de la gazetaro.
Helpe al tia prilaborado baldaŭ aperos vasta broŝuro de k-do de Bruin, nia historiisto, kun titolo: „De Esperanto-literatuur in Vogelvlucht", destinita por gravaj instancoj en la publika vivo.
Alia broŝuro, preparenda kaj espereble baldaŭ preparata, estas: „Internationaal congresseren", por propagandi la uzadon de Esperanto en internaciaj kunvenoj.
En praparo estas ankaŭ kelkaj afiŝoj por la Verda Monato, kaj nova lernolibro, bazita sur la plej novaj ideoj pri la tekniko de la lingvostudado kaj adaptita al la karakterizaj ecoj de Esperanto kaj al la spertoj pri la instruado de Esperanto al laboristoj.

Baldaŭ post la liberiĝo la studemo de niaj membroj revenis: eksatiĝis la stomako — jam alarmis la spirito!
Atendante favoran momenton por reeldoni „La Progresanto-n", ni organizis refreŝigajn kaj daŭrigajn korespondajn kursojn, kiujn multaj partoprenis.
Komence de ĉi tiu jaro ni fine sukcesis denove eldoni „La Progresanto-n". En kaj ekster nia Federacio oni streĉe atendis ĝian reaperon.
La nombro da abonantoj ĉiumonate pli altiĝas kaj estas nun 1412.
Ĉi tiu studemo kaj la atendata neceso baldaŭ fondi elementajn kaj daŭrigajn kursojn postulas plivastigon de nia instrua stabo: ni bezonas kursgvidantojn. Tial ni starigis komitaton, kiu por la venonta studsezono ellaboros skriban B-kurson.

Sed studado ne havas sencon, se oni ne intencas *apliki* la lingvon. El la kreskanta nombro da S.A.T.-anoj en nia lingvo-regiono evidentiĝas, ke niaj anoj atentas ankaŭ la praktikan flankon. Kun la reboniĝo de la internaciaj rilatoj reboniĝas ankaŭ nia mondorganizo. Vojaĝado eksterlanden estas preskaŭ tute ne ebla, sed jam tre vigla estas la internacia korespondado.

La eldono de literaturo havas jam de longa tempo nian atenton, sed la manko de papero kaj la multokupiteco de la presistoj estas ankoraŭ granda baro.
La Literatura Komitato jam kelkan tempon laboras kaj kontrolis i.a. la unuan fojon eksterlandan eldonaĵon.

Gekamaradoj,
Malrapide, sed decide nia movado restariĝas. Ni estas certaj, ke post nelonge ĝi reokupos sian antaŭan pozicion. Sed tio ne sufiĉos. El materia vidpunkto la homaro vivas rapide, sed spirite ĝi lamas post la tekniko. Ni atendas, ke en ne tre malproksima estonteco la modernaj trafikrimedoj prezentos multe pli da ebloj por internaciaj rilatoj ol antaŭ la milito, kaj al tiaj rilatoj pli forte instigos. La ĝenerala deziro de la amaso pri nova, pri socialisma mondordo neeviteble kondukas en la sama direkto. La lingva diverseco pli kaj pli evidentiĝos anakronismo nepre forigenda.

Pasko — Renaskiĝo — Rekonstruo!
Ĉe le rekonstruado de la socio ni, laboristaj esperantistoj, volas alporti nian ŝtonon por fari la mondon pli loĝebla kaj komprenebla. Pri tio atestu ĉi tiu kongreso.
Niaj diskutoj estu konstruaj. Kun plena respekto por la kontraŭa opinio ni esprimu la nian, konvinkitaj, ke ĉiu deziras laŭ sia maniero la bonon de la organizo.
El tiu ĉi tritaga kunestado kaj kunlaborado ni reaperu en la mondon renaskiĝintaj: pli aktivaj, kaj pli persistemaj ol iam ajn antaŭe.
Kun tiu deziro mi deklaras la kongreson malfermita!

SALUTOJ.
K-do Piron jene salutis la kongreson:
Karaj gekamaradoj,
En la nomo de la plenumkomitato de S.A.T. mi salutas vian 27an kongreson kaj esperas, ke ĝi estos plensukcesa. S.A.T. havas nun en Nederlando pli da membroj ol ni antaŭ la milito. La afero daŭre kreskas, do ni povas multon esperi. Ni devas praktikadi la lingvon. Tial necesas viziti nian tutmondan kongreson. Ankaŭ la S.A.T. amikaro, nova organizo en Francio salutas. vin. Malgraŭ malfacilaj cirkonstancoj ni neniam ĉesis kotizi kaj aperigi nian revuon. La sekretario de F.E.T. propravole aliĝis al la neŭtrala movado. Tiam necesis krei novan organizon, kiu sekvas la antaŭajn direktivojn. Ĝi jam transpasis la nombron da membroj, kiun ni havis antaŭe. Ni invitas vin al vetkuro kaj, se vi ne volas malvenki, necesas, ke vi multe laboru. Materiaj kondiĉoj ankoraŭ malhelpas nin.
Sendube la estonteco estos nia. Ni havas kontakton kun k-do Bartelmes en Germanio. Li estis milikapitito kaj suferis en diversaj koncentrejoj francaj kaj germanaj. Malgraŭ tio li ne forlasis nian idealon. Li sopiras reveni al Parizo, sed tio nun ne estas facila. Koran dankon al F.L.E. pro la bonaj aranĝoj kaj ankaŭ al k-doj Wels kaj van Essen.

Salutparolado de k-do Rosell.
Estimataj gesamideanoj, gekamaradoj,
En la nomo de S.L.E.A. mi havas la grandan honoron saluti vian kongreson. Mi vere ĝojas, ke mi povas esti ĉi tie kaj min speciale kortuŝis viaj bonaj vortoj al ni svedoj. Vi preskaŭ troigas nian bonkorecon. Kompreneble ni faris ion por vi. Ni ĉiuj estas homoj kaj certe estas bone, se la homoj komprenas la bonan senton. Vi komprenis, ke nia donaco venis el nia koro. Tamen, nek mi, nek mia asocio meritas tian oferon, kian vi faris al ni. Ni esperas rekompenci vian oferon. Mi rimarkis, ke vi ciuj parolas tiom bone kaj flue, kvazaŭ vi estas denaskaj esperantistoj. Dio kreis la mondon, sed, vian landon vi kreis mem. Kaj same energie vi agas kiam temas pri lingva afero. Hieraŭ vespere mi ĝuis vian programon. Ne temis nur pri amuzo. La movado en nia lando suferis sufiĉe multe dum la milito. Multaj militservis kaj laciĝis. Tamen ni denove kreskas. Al S.A.T. ni povas donaci ne tiom, kiom vi, sed eble ion bonan. Mi ĝojas, ke ankaŭ vi kunlaboras kun aliaj Esperanto-organizoj. Ni sentas nian devon servi la movadon kaj en la propagando ni devas helpi unu la alian. Dankon ankaŭ al la organiza komitato, kiu tiom bone aranĝis la aferon. Ĝi estas preskaŭ internacia kongreso. Mi havas ankaŭ donacon por vi. *(Dirante tion k-do Rosell disvolvis belegan grandan esperanto-flagon).*
Ĝi memorigu vin pri la svedoj. Plie mi havas ion por la muzikistoj. Sperta komponisto verkis marŝon „Vivu Esperanto". F.L.E. ĝin presigu kaj poste vendu por akiri monon. Ĉe ni oni ofte prezentas ĝin en la radio-programo.
La prezidanto k-do Faŭlhaber esprimas la koran dankon de la kongreso kaj proponas tuj pendigi la flagon ekstere. La kongreso aplaŭde akceptas.
Salutparolo de k-do Holger Hansen.
Karaj gekamaradoj,
En la nomo de la dana laborista asocio mi havas la grandan honoron saluti vin kaj deziri ĉion bonan al la kongreso. Via invito tre ĝojigis min. Mi kunportis simbolan telegramon, kiun vi bonvolu akcepti kiel bondeziron de viaj danaj gekamaradoj.
K-do Faŭlhaber danke akceptas kaj promesas ĝin pendiĝi en la oficejo de la Libro Servo kiel daŭran memoraĵon pri lia vizito.
Salutparolo de k-do Rosenbloom.
K-do prezidanto, gekamaradoj,
Mi staras antaŭ vi kiel kvazaŭa malamiko, ĉar vi primokis la anglan lingvon hieraŭ vespere. Winston Churchill estas la ĉefa propagandisto de ĉi tiu lingvo, tamen kio okazis al lia partio? Oni tute ignoris ĝian propagandon. Kaj ni ne atentu lin en la lingva sfero. Mia tasko estas transdoni al vi tutkorajn salutojn de S.A.T.E.B. Antaŭ du semajnoj ni havis konferencon apud Birmingham. Koncerne la membronombron vi estas dekoble pli fortaj ol ni. Tio klarigas, kial ni ne ĉiam tuj povas respondi al viaj petoj pri korespondado, vi do indulgu nin. Ni sendube akiros tiom da membroj kiom havas vi. Mi deziras sukceson al la kongreso.

Salutparolo de k-do Brown el Londono.

Prezidanto, estraro, karaj gekamaradoj.
Estas por mi granda plezuro troviĝi inter vi. Kaj agrable estas religi la fadenojn disŝiritajn de la milito. Dum tiuj jaroj vi ĉiam estis en nia memoro. Spirite ni ĉiam estis kune kaj ni ofte priparolis vian sorton. Bedaŭrinde ni ne povis organizi kolektivan helpon. Mi deziras al la kongreso plenan sukceson.
Poste sekvas salutparoloj de s-ro Zeiler, reprez. de L.E.E.N., k-do Schooneberg nome de Alg. Ned. Grafische Bond, kaj k-dino Corry de Cock nome de la flandraj sekcioj de F.L.E.
Plie ni ricevis abundon da salutleteroj, de enkaj eksterlandaj esperanto-asocioj, de gravaj organizoj, sindikatoj kaj esperantistoj el propra kaj aliaj landoj.
K-do Varkevisser (Hago) donacas al la dana gasto portreton de d-ro Zamenhof, kiun k-do Hansen danke akceptas.

LA MILA SAT-MEMBRO.
Post la malfermo k-do Wels, per kelke da konvenaj vortoj transdonis al k-do Piron la milan membron de S.A.T. en Nederlando.

Ĉeestlisto.
En la kongreso ne estis reprezentataj la sekcioj: A'dam 14a, Almelo, Andijk, Heerlerheide, Hoorn, Kerkrade, Krimpen a/d. Lek, Maastricht, Middelburg, Vaals, Vlissingen, Waubach, Winterswijk, Antwerpen 1a, Antwerpen 2a, Deurne, Merksem kaj Willebroeck.

Tagordo.
Sendiskute oni akceptas proponon 2an de sekcio Heiloo.

Sekretaria raporto.
Haarlem: Laŭdinte la laboron de la federacia estaro, la delegito esprimas la deziron, ke L.E. denove aperu pli ampleksa. Ankaŭ rilate „La Progresanton" li havas saman deziron.
Arnhem: Grandparte konsentas pri la laŭdoj, direktitaj al la federacia estraro, sed tamen havas plendon rilate neglatan funciadon de la organiza aparato. Generale li havas la impreson, ke oni ne sufiĉe atentas la interesojn de la malproksimaj distriktoj. Arnhem ne povas konsenti pri la telegramo al ministro Logeman. Rilate la gazetarservon li riproĉas, ke ĝi erare menciis regulan Esperanto-rubrikon en Spartacus kaj male forgesis nomi tiun en la Bellamy-gazeto. Kiel prezidanto de la distrikto Gelderland li esprimas sin por la nova strukturo, kvankam ĝi donas al la distriktestraroj pli grandan respondecon. Li sugestas fondi regionajn distriktojn.
Rotterdam 5a: Iom kritikas la decidon de la ekzamena komitato ne plu ekzameni je dimanĉo, pro perdo de duontaga salajro krom la kostoj de la ekzameno.
La sekr. k-do Kruit respondas:
Ke ankaŭ li forte deziras pliampleksigi L.E. kaj L.P., sed tio provizore ne estas ebla pro tro altaj preskostoj.
La plendo de Arnhem pri ignoro al la malproksimaj distriktoj rezultas el pli malpli subjektiva sento. Ni ĉiam atentas la interesojn de la tuta lando. Sed la poŝto efektive ankoraŭ nenormale funkcias. Rilate la telegramon li ne povas samopinii kun Arnhem, ĉar se la ministro ricevus nur telegramojn de la reakcia flanko, li ne scius la opinion de la tuta nederlanda popolo. La plendon pri la gazetarservo li ne povas akcepti, ĉar oni ne ĉiam povas gardi sin kontraŭ eraraj informoj. Rotterdam 5a pravas, sed, kvankam ni tute konsciis pri la malfacilaĵoj, ni faris oferon por ne rompi la ĵus aranĝitan kunlaboron. Ni akceptis ĉi aranĝon prove por unu jaro.
La sekretaria raporto estas unuanime akceptata.

Kasista raporto.
K-do Spaarenberg por la kaskontrola komitato laŭdinte la librotenadon de k-do Pouli, rimarkiĝas, ke en la raporto pri la Libro-Servo troviĝas preseraro. Liaopinie ankaŭ estu menciata la valoro de la libroj, troviĝantaj ĉe la diversaj presejoj. La vera bilanco do devus mencii pli altan sumon. Li atentigas, ke ankaŭ en la buĝeto oni ne tro alte fiksu la elspezojn.
La kasisto k-do Pouli respondas, ke k-do Spaarenberg pravas rilate la malferman bilancon, sed li opinias, ke se ni ne mencias la librojn en stoko ĉe la presejoj, ni poste havos pli grandan profiton. Laŭ komerca vidpunkto tio estas defendebla. Ĉi tiun jaron li faros novan kalkulon kaj la bilanco havos la ĝustan valoron, ankaŭ de la libroj, kiuj estas en stoko.
La raporto estas akceptata.

Redakcio L.E.
Rotterdam 4a kritikas la agadon de la redaktoro, koncerne la aferon Krijt. La sekcio sendis proteston al la federacia estraro kaj post 5 monatoj oni ankoraŭ ne scias, ĉu s-ro Krijt estas kulpa aŭ ne. Pro ĉi ĉio lia sekcio ne povas aprobi la redakcian agadon.
Hago opinias, ke ne estas ĝuste doni tiom da spaco por la sekciaj kaj distriktaj komunikoj. Por tio ili uzu siajn proprajn gazetojn. La delegito kritikas la artikolon pri U.L. en kiu oni atakis la personon de s-ro Cseh. Oni nomis lin trompanto, sed tion li absolute ne povas akcepti. La rezulto estas, ke s-ro Cseh, kiu antaŭe ĉiam kunlaboris kun lia sekcio, nun nepre rifuzas.
K-do Schonenberg por la estraro respondas rilate la skrupulojn de R'dam 4a pri la afero Krijt, ke ĉirkaŭiris onidiroj, kiuj ŝajnis al ni sufiĉe veraj por aperigi tiun artikolon. La komitato, kiun oni starigis por tio ankoraŭ ne finis sian esploron. Al Hago li respondas, ke la komunikoj havas propagandan valoron. U.L. ne estas serioza organizo. Ni ne kredas, ke ĝi staras super la tendencoj. Hago ne tute ĝuste interpretas la artikolon de k-do Veen, ĉar li ne diris, ke la afero *estas* privata entrepreno, sed li skribis ke ĝi *aspektas* tia.
La sekr. k-do Kruit ankoraŭ aldonas, ke sekcio Hago laŭdas s-ron Cseh, sed antaŭ ĉio ni rigardas la aferon ne la persono sed laŭ organiza vidpunkto.
Nur R'dam 4a malaprobas la redaktadon de L.E.
Fino de la unua kunsido.
(Daŭrigo en sekvonta L.E.)

Letero de la prezidanto

Karaj gek-doj,
Nekutima kaj malĝojiga kaŭzo devigas min ĉi foje skribe saluti vin anstataŭ partopreni persone en nia kongreso.
Malgranda ŝtoneto en la gal-veziko katenas min sur la lito. Daŭre mi ankoraŭ havis esperon, ke ĝi foriĝos sufiĉe frue por ebligi al mi ĉeesti nian 27-an en Alkmaar. Bedaŭrinde la sorto ne favoris, kaj vaporiĝis la lasta eblo ankoraŭ ĉeesti en ĉi tiu por nia organizo, kaj por la esperanto-movado, tiom grava kongreso. Evidente en proksima tempo la perspektivoj por la disvastiĝo de nia lingvo grave plilarĝiĝos.
Depost la militfiniĝo nia organizo sukcesis grandparte rekonstrui sian aparaton.
Efektiviĝis jam grava decido akceptita en nia 26a, kaj bazo de kunlaboro inter la 4 esperanto-organizoj realiĝis en Nederl. centra Komitato Esperantista.
Pluraj fakoj de nia organizo denove kontentige funkcias. Esperanto-elsendo en kunlaboro kun V.A.R.A., jam okazis. Sendube ĉi tiu, nia 27a kongreso, fariĝos grava kaj multsignifa por la estonto de nia movado.
Por plej celtrafe atingi nian celon mi esprimas la deziron, ke ĉi tiu, nia 27a, trovu tiun homogenan unuecon organizan kiu konsistigas la organizan forton plej favoran al la principa bazo de nia Federacio, plej favoran al la venko de nia idealo. Ke nia 27a estu plej sukcesa!
Estu certaj, ke miaj pensoj daŭre estas inter vi! A. Veen.

Dana-Nederlanda esperanto-interhelpo

KONCIZA RAPORTO.

La sorto, kiu per la milito trafis Nederlandon, vekis ĉe la dana popolo grandan simpation kaj kunsenton. Spontane oni ekdeziris kiom eble plej efektive mildigi la efikojn de la katastrofo, ĉie en la lando organiziĝis la klopodoj por helpi la nederlandan popolon per la plej necesaj nutraĵoj kaj aliaj urĝaĵoj. De tiu laboro la danaj esperantistoj, de antaŭ la milito per multnombraj fadenoj persone ligitaj al la nederlandaj kamaradoj kaj samideanoj, ne povis sin reteni.
Sub la devizo „la danaj esperantistoj helpu la nederlandajn esperantistojn" eklaboris en junio 1945 „Dana-Nederlanda Esperanto-interhelpo". Ĝi estis la unua el la t.n. „kolega helpo"j, kiuj poste organiziĝis multnombre (kuracistoj, metiistoj, botanikistoj, inĝenieroj ktp.). Tute nature la internacie orientitaj esperantistoj, avide atendintaj rekontaktiĝi trans la hermetikajn landlimojn, sentis sin nun pretaj, tuj aktiviĝi en pozitiva praktika laboro.
Kiel ĉefa peranto en Nederlando funkciis S-ro Bas Wels, Roterdamo. Sinceran dankon oni ŝuldas al li pro la grandega distribua laboro, kiu subite kaj preskaŭ sen antaŭa averto estis trudata sur liajn ŝultrojn.
Entute la esperantistoj kolektis 1.505 kg. da nutraĵoj (Proksimuma mona valoro: 3-4000 Kr.). Krome la esperantistoj kolektis ilojn por kuireja, konstrua k.s. laboroj — pro praktikaj kaŭzoj tiuj iloj devis eniri la ĝeneralan nederlandhelpon.
La mono kolektita sumiĝis ĝis 4000 Kr. Krome ni per „Hollandshjaelpen" ricevis ŝtatan subvencion de 3.500 Kr. Entute „Dana-Nederlanda Esperanto-interhelpo" sendis — kiel montras la apuda statisiko — al Nederlando: [1])

nete 4.617 kg. da varoj,

parte kolektitaj parte aĉetitaj. La monvaloro de tiuj varoj povas esti kalkulataj je iom pli ol

10.000 danaj Kr.

La suma nombro de organizitaj esperantistoj en Danio estas ĉ. 1000.
La danaj esperantistoj bone konscias, ke la atingita rezulto de la agado nur povis fariĝi tre modesta helpo, nekomparebla kun la bezonoj ĉe la esperantistaro de prirabita kaj turmentita popolo. Sed per la agado ili deziris fari praktikan manifestacion por emfaze esprimi la senton de solidareco kaj simpatio al iliaj nederlandaj samideanoj, karamadoj, amikoj.
Entuziasme la danaj esperantistoj laŭ modesta povo faris siajn klopodojn, kaj entuziasmon siaflanke esprimis al ni pli ol 600 dankleteroj ricevitaj el Nederlando. Tiun interkontaktiĝon jene atingitan ni rigardu kiel fortan manpremon inter la esperantomovadoj de du malgrandaj popoloj, kiel festan inaŭguron de nova vigla kunlaboro por baldaŭa fina venko de nia lingvo. PAUL NEERGAARD.

Kopenhago, Aprilo 1946.

[1]) La statistiko kaj kasraporto montras detalojn, por kiuj mankas spaco en nia gazeto. Ili estas haveblaj ĉe le estraro. Red. L.E.

ESPERANTO STENOGRAFIE!

In de „Groote" Schrijver, maandblad van de Federatie voor Stenografie „Groote" komt in de nummers van Dec., Jan., Febr. en Maart voor, de gevoerde correspondentie over het vaststellen der tekens van het Nederlands Alfabetisch Kortschrift voor Esperanto. Hoewel nog geen definitief besluit is genomen, kan wel met zekerheid aangenomen worden, dat **binnenkort het alfabet in de „Groote"** Schrijver wordt afgedrukt. Het plan bestaat van tijd tot tijd een stukje Esperanto-Stenografie op te nemen. Voorts om propaganda voor dit systeem te maken in de Esperanto-bladen.
De heer Roosdorp besluit met de mededeling: „De laatste weken heb ik zeer veel Esperanto in „Groote" gestenografeerd. Het schrijft vlot en is perfect leesbaar."
Zonder twijfel zullen de stenografen in onze rijen dit bericht met grote vreugde ontvangen. Wij adviseren een schriftelijke adheasiebetuiging te zenden aan de redactie van de „Groote" Schrijver, den heer P. Korthuys, van Zuylen van Nijeveldstr. 126, Wassenaar. J. v. W.

(Hierbij merken wij op, dat ook van ons Esperanto-congres een stenografisch verslag werd gemaakt. Red. L.E.).

DE LA ESTRARO.

Propagandaj flugfolietoj.

Okaze de la unua de majo ni disdonis grandskale malgrandan flugfolion. Ni intencas fari tion ankaŭ en junio okaze de la balotado por la komunumaj konsilantaroj. Ŝajnas al ni plej racie, ke tie, kie ekzistas urba distrikto, ĝi dividu la laboron por la disdonado. Tial en tiaj distriktoj la distrikta sekretario mendu, en ĉiuj aliaj lokoj tion faru la sekciaj sekretarioj. Mendu tuj, ĉar nur per granda peno ni povas havigi al ni paperon!

Mendu antaŭ la 31-a de majo.

Fdv.

ATENTIGO

La redakcio-adreso estas: Middenweg 226, Amsterdam (O.), al kiu adreso oni sendu ĉion destinitan por nia gazeto. Manuskriptoj kaj informoj estu koncizaj kaj legeble skribitaj.

WIJ SPRAKEN MET

Mr. J. Mannoury, juridisch adviseur van het N.V.V.

„Mr. Mannoury, U bent zelf Esperantist nietwaar; het is mij verder bekend, dat U cursussen in Esperanto hebt geleid. Wilt U mij eens daar iets van vertellen?"

„Ja, inderdaad ken ik Esperanto en heb er enige cursussen in gegeven. Daarbij heeft het mij vaak getroffen, dat het aantal leerlingen, dat ons gedurende de cursussen ontrouw wordt, betrekkelijk gering is."

Hier keek ik mr. Mannoury enigszins verwonderd aan, wel wetende, dat velen onzer cursusleiders minder prettige ervaringen in dit opzicht hebben.

„U moet mij goed begrijpen", merkte mr. Mannoury, die mijn verwondering zag, op: Het verloop van de Esperanto-cursussen is veel minder groot, dan veelal het geval is bij andere leergangen van enige duur, niettegenstaande in het leren van Esperanto voor den arbeider nu niet onmiddellijk een economisch belang is gelegen. Steeds heb ik met grote voldoening kunnen constateren, hoe het Esperanto den weetgierigen arbeider, die ermede kennis maakt, blijft boeien. En dat zonder enig in geld tot uitdrukking komend voordeel."

„Nu wat het Engels betreft, zou U mij misschien eens Uw mening over het Basic-English willen zeggen?"

Het Basic-English lijkt mij een zeepbel. Het laat zich aardig aanzien, maar het kan nimmer voldoen. In de eerste plaats is het arm aan uitdrukkingen, waardoor de gebruiker steeds in verlegenheid zal geraken, in de tweede plaats zullen de Engelsen er zelf op den duur weinig voor gevoelen en er waarschijnlijk ook niet toe in staat zijn, zich te voegen naar de kennis van den Basic-spreker."

„Acht U het uit deze overwegingen nuttig, dat de arbeiders het Esperanto leren?"

„Ja, dat vind ik ongetwijfeld. De studie van het Esperanto geeft den leerling na een korte tijd reeds min of meer voldoening. Hij kan zich al spoedig verstaanbaar maken in de taal en eenvoudige literatuur daarin genieten. Om zulk een resultaat met enige andere taal te bereiken, zouden jaren van studie nodig zijn en.... ik heb dit reeds eerder gezegd, de meeste arbeiders kunnen zulk een studie niet volhouden. Hiermede wil ik niet zeggen, dat het vermogen om te volharden bij anderen zoveel groter is, doch daarmede kom ik weer tot mijn punt van uitgang: Anderen worden vaak gedreven door een economisch motief."

„Ziet U het Esperanto dus meer als een ideële dan als een practische zaak?"

„Nee, deze conclusie mag U niet aan mijn woorden verbinden."

„Natuurlijk heeft het Esperanto als ideaal een onschatbare waarde, maar behalve dat heeft het ook een grote practische betekenis. Hoeveel tijd zou er bijvoorbeeld niet worden bespaard, indien op internationale congressen van de arbeidersbeweging met het gebruik van deze ene taal zou kunnen worden volstaan! Een internationaal congres, dat nu veertien dagen duurt, zou met drie dagen afgelopen kunnen zijn. Maar behalve dit zou het gebruiken van Esperanto als voertaal op internationale congressen de orde en rust bevorderen. Nu constateert men, dat de bezoekers van dergelijke congressen, die het gesprokene niet kunnen verstaan, zich met elkaar gaan onderhouden, waardoor een onaangenaam geroezemoes ontstaat.

„Wat ik nu zeide over de tijdbesparing op internationale congressen, dit blijft voorlopig nog een wenselijkheid. Deze kan eerst op de duur, wanneer het Esperanto algemeen is verbreid, worden verwezenlijkt. In de toekomst zal de grote practische waarde van het Esperanto ongetwijfeld meer en meer blijken."

„Daarvoor is het nodig, dat de arbeiders de taal leren."

„Inderdaad en ik wek hen gaarne op zich met ijver aan de studie van het Esperanto te wijden."

Het was inmiddels reeds laat geworden en wij eindigden ons gesprek. Laat ons hopen, dat vele arbeiders aan de opwekking van mr. Mannoury gehoor zullen geven. Zodoende is het mogelijk, dat ons practisch ideaal op ideale wijze in de practijk toepassing zal vinden.

H. SCH.

LIBRO-SERVO

Tre interesa verko, precipe por la nuna tempo:

RIGARDANTE MALANTAŬEN

(IN HET JAAR 2000),

la konata romano de Edw. Bellamy, tradukita de C. H. Hamaker, prezo f 2.75.

★

Voor bijzondere studie zeer aan te bevelen:

GEBONDEN STIJL

van F. Faulhaber,

f 0.35

een voorlichting over poëzie in Esperanto.

★

EIGENNAMEN

van G. J. Degenkamp

f 0.35

richtlijnen betreffende het vertalen van geografische en persoonsnamen, namen van volken, dieren, planten, hemellichamen, organisaties, straten, gebouwen etc.

Libroservo F.L.E., Postbus 8002, Amsterdam-W.

Tra la esperanto-gazetaro

Daŭre pli regule atingas nin gazetoj aperintaj en Esperantio.

Atesto pri vivo kaj vigleco. Spegulo de la animstato kaj vivoforto. Plej gravaj estas la asociaj organoj. Ili ja rezultas el la organizita movado, la motoro de la maŝino, kaj estas mezurilo de la aktiveco, progreso kaj disvastiĝo de la esperantistaro. Ili donas al ni la bildon pri la stato tiel internacia kiel nacia, de nia movado tutmonda.

Ne eblas priskribi detale ĉion, pri kio la esperanto-gazetaro raportas, sed eble resuma mencio pri la en nia redaktejo ricevitaj plej gravaj organoj interesas niajn gelegantojn.

En januaro surprizis nin la reeldono de **Sennaciulo** sub la nomo de **S.A.T.-Bulteno;** en februaro ĝi aperis sub la nomo **La Kosmopolito.** Redaktas ĝin k-doj Bannier el Parizo kaj Bas Wels el Rotterdam.

Krom la organizajn informojn al la membroj, kaj deklaron pri la pozicio de la organizo kaj ties celon, ĝi ankaŭ enhavas interesan artikolon pri la vivo de terkultutisto en Indonesio. Interesa artikolo de k-do Kruit, verkita jam en la jaro 1940, pri la L.E.A.-Komitato okulfrape montras sian nuntempan aktualecon.

La ne-eŭropanoj en Sud-Afriko pledas por egalrajteco kun la eŭropanoj (art. transprenita el „Per Unu Voĉo").

La reapero de Sennaciulo en ĉi tiu formo estas ĝojiga fakto, kaj sendube stimula al la laborista Esperanto-movado. Ĝi montras, ke la S.A.T.-movado restariĝas post tuta frakaso de la organiza aparato en la milito. Ni gratulas la eldoninton, kaj deziras al ĝi vastan sukceson. Adreso: 1e Wandeloorddwarsstraat 33, Rotterdam.

La organo de **I.E.L. Esperanto Internacia,** kiu dum la milito regule aperis dumonate, ek de januaro pasinta aperas monate. Informoj kaj artikoloj el diversaj landoj pri movado kaj okazaĵoj. Detala Esperanto-Radio-Programo. Informoj pri la organizo k.t.p. Adreso: Heronsgate, Rickmansworth, Anglio.

De U.E.A. ni ricevis la unuan postmilitan numeron de **Esperanto.** Adreso: Hans Jacob, Palais Wilson, Genève, Svislando.

La organo de S.A.T. en Britio, **The Worker Esperantist,** aperas trimonate kun tre interesa enhavo pri la Esperanto-movado en Anglio kaj aliaj landoj. Serioze redaktita kun trafaj artikoloj.

Redakcia adreso: 55 Lambert Road, Banstead, Surrey, Anglio.

Bibliografio

La Araneoj de prof. Agostinho da Silva; Esperantigis M. S.; Eld.: Manuel de Freitas, Porto, Portugalio; 24 paĝoj, 16 x 11½ cm. Libreto el serio „Cirkaŭ la mondo", al kies apero mi atribuas grandan valoron malgraŭ, aŭ eble dank' al la konciza enhavo, ĉar ĝi estas instrua ne nur pri la interesaj temoj, sed ankaŭ pri la diversflankaj terminoj, uzataj en la teksto. Jam pro tio lasta la verketo estas rekomendinda: la leganto senpene lernas nekutimain terminoin, kiuin li per nura uzo de vortaro ne tuj komprenus, tiom malpli memorus.

La lingvaĵo estas ĝenerale bona kaj flua; stranga aspektas la evidente portugala ellaso de subjekto en frazo kia: *tuj kiam (ĝi) atingas la plejan grandecon ĝi....* Rimarkindaj estas la adjektivo *etkalibra* kaj *etdiametra.* nefakuloj ŝajnas neklara la vorto *griltalpo* (veenmol), kiu supozigus ian talpon, kvankam temas pri speco de insekto. La nomo estas tamen bone formita el la sciensa *Gryllotalya.*

G. J. D.

Uit de Afdelingen

ATENTU.

K-do v. Haren — acocio-estrarano — pretas paroladi en la Distriktaj „Kunvenoj" pri: La tasko de la Distriktoj rilate Propagandon kaj Instruadon.

AFD. AMSTERDAM I (A.L.S.E.).

En junio, pasintjare, ni kun proksimume 60 anoj denove fondis nian karan sekcion en la Suda kvartalo en Amsterdamo.
Ni decidis jaŭdvespere konversacii kaj ni tuj aranĝis elementan kurson, sub gvidado de k-dino de Vries. 38 kursanoj alterne partoprenis. En oktobro ni aranĝis duan elementan kurson, kiun partoprenis 22 kursanoj; gvidanto estas k-do Dubois.
El tiuj kursoj 26 partoprenas la daŭrigan kurson. Dum la unuaj kvar monatoj ni ripetadis i.a. la gramatikon. Du radioteatrajoj, verkitaj de nia prezidanto — k-do Preker — estis prezentataj de kelkaj membroj.
K-do Zachte, la malnovulo de nia sekcio, transloĝiĝis kaj ne plu povis viziti nian klubon. Li fariĝis „honora membro" de nia sekcio.
La k-doj Aarse kaj Pijlman alternsemajne pritraktas la gramatikon. Poste kantado akompanata de violono kaj banjo kaj prelegoj.
Dum nia lasta interna kunveno ni elektis tri novajn estraranojn. La nuna estraro konsistas el la jenaj membroj:
K-doj J. Preker, Prez.; W. Dekker, P. Basstraat 12², Sekr.; D. Appel, Granaatstraat 4², Kas.; J. Veldman, 2a Prez.; J. Uelman, 2a Sekr.; K. Dekker, 2a Kas; A. Cremer, Asesoro.

AFD. AMSTERDAM II „NI VOLAS LUMEN"

IMITINDA EKZEMPLO.

En la unua kunveno post la brila 27a Kongreso de nia Asocio la delegito raportis. La ĉeestintoj tiom entuziasmiĝis, ke ili unuanime decidis formi ŝparkason, kun la celo grandnombre viziti la venontan kongreson en Heerlen.
Kamaradoj, sekvu tiun ĉi imitindan ekzemplon, nia 28a estu ankoraŭ pli brila kaj impresa ol la bonega kongreso en Alkmaar. Formu ŝparkason! A.K.

PRINTEMPA FESTO.

Ĉi tiu festo, kiun ni propagandcele organizis, okazis sabatvespere la 27an de aprilo.
Ĝi estas plena sukceso, ĉar multvizitata kaj altnivela el distra vidpunkto.
Konsiderante la rimedojn tre modestajn, ni ne povas ne gratuli kaj laŭdi gekdojn. Ooijevaar, Willemse kaj Nieuwenhoff pro la rezultato de ilia laboro.
Menciinde estas, ke la kunlaborintaj neesperantistoj senprofite disponigis al ni siajn talentojn. Ni ŝuldas dankon al s-inoj. v. d. Burg kaj Jungen kiuj ravis nin per sia delikata kantado, parte esperantoteksta.
Same faris sinj. Nijhuis kaj Barf. Majstre ilin akompanis pianlude k-dino Willemse kaj sinj. Ooijevaar. Ĉi-lasta prezentiĝis ankaŭ kiel solisto, aŭdigante modernajn kantojn kun propra gitarakompano.
Fine aperis antaŭ la forumo k-doj Essenberg, Nieuwenhoff kaj Ooijevaar, el kiuj la du unuaj kiel deklamantoj kaj la lasta kiel kantanto.
La tutan programon ĝuis la ĉeestantoj kiuj espereble ankaŭ interesiĝis pri la celo de la kunveno. V.

AFD. AMSTERDAM VI.

Je la *unua de junio* nia sekcio festos sian kursfinan feston, en „Marco Polo", Marco Polostraat. La salono povas enhavi 200 personojn, kaj ni do nepre devas vendi tiom da enirbiletoj; se vi ĉiuj kunlaboros tio eblas. Ĉiu ano vendu kvar aŭ pli da kartoj; la programo estas tre interesa kaj ampleksa. Ni invitis k-don G. J. Degenkamp kiu parolados por ni.
Ĉar ni atendas multe da ne-Esperantistoj la programo estos nederlandlingva.
La vespero devas esti sukcesplena! Do ĉiu venu! La propaganda-komitato,
Sekr. A. M. D. Korff. Bestevaerstr. 123

AFD. AMSTERDAM VII. „ESPERANTO VENKOS".

Je mardo, la *4an de junio*, ni okazigos festvesperon en la granda solono de Nieuwendammerham. *Eniro* por klubanoj, kursanoj, parencoj, amikoj(inoj) k.t.p. *senpaga*.
Ni komune kantos kaj ludos mandolinorkestro, sed ni ne diras plu; venu kaj vidu! Ĉiuj aliaj kiuj volos viziti tiun ĉi vesperon, skribu al la sekretario, kaj li sendos al vi enirbileton.

G. P. Relleke, sekcretario,
Meidoornplein 5b, A'dam-N.

AFD. DEVENTER. „FRATECO".
Secr.: van Mauwijkstraat 6.

„Frateco" en Deventer okazigos letervesperon. Sendu la korespondajojn al, H. Timmer, van Mauwijkstraat 6, Deventer, Holland. Ĉiu korespondajo estos nepre respondata!

AFD. GRONINGEN. „LA NORDA STELO".
Secr.: Oliemuldersweg 166.

En nia jarkunveno, okazinta la 18an de aprilo, k-do R. v. Kempen eksiĝis kiel sekretario.
La kunveno elektis kiel sekretarion k-don J. Schrage, Grunostraat 8; K-do v. Kempen estis elektita kiel 2a kasisto.
K-do G. J. Minholts, kiu gvidas komenckurson en Zuidlaren, sukcesis starigi sekcion. Ni decidis donaci al la juna sekcio 25 guldenojn, por ke ĝi povu komenci la laboron. Ni esperas, ke nia pli juna ido prospere grandiĝos.
La estraro konsistas el: k-doj Jac de Jonge, Prez.; D. Stoffers, Kasisto kaj J. Zandvoort B 109, Zuidlaren, Sekretario.
Gek' doj atentu.
Jaŭdvespere la 16an de majo proks. k-do Puister parolados pri la vivo de Antonie van Leeuwenhoek, la unua bakterioĉasisto. Kunportu paperon kaj krajonon por noti nekonatajn vortojn.
Ni esperas, ke en la estonteco, anoncos sin pli da gek-doj por prelegi aŭ pritraktado de diversaj temoj.

AFD. ZAANDAM.
Secr.: Schubertstraat 18

Ĉe la finiĝo de la komenca kurso, ni dankas k-don Brondijk pro lia bonkvalita gvidado. Ni esperas, poste rikolti la fruktojn de lia laboro. Ni donacis al li rememorajon.
K-do Thoman surprizus nin per du esperantaj gramafon-diskoj. Anoj, kiuj interesiĝas pri tiuj diskoj, povas pruntepreni ilin ĉe la sekretario.
Ni ankaŭ danku k-don Vonk pro la esperanto-steloj, kiujn li por ni faris. Propagandcele ni instigas niajn gemembrojn pendigi tian *senkostan* stelon sur la domon.
La partopreno al la Federacia Kongreso estis granda. Aŭtomobile ni 35-ope vizitis la interfratiĝvesperon. La prezidanto kaj sekretario, kiuj en la lasta bonsfera membrokunveno estis elektataj kiel deligitoj, reprezentis nian sekcion en Alkmaar kaj baldaŭeble raportos pri ĉio ajn. La Estraro.

Uit de Districten

DISTRICT ROTTERDAM.

Grava ekskurso por la R'damanoj! Dimanĉon, la *26an de majo*, ni estos gastoj de la Delfta sekcio, kies gastamo estas fama. Ni kunvenos en Nia Domo (Oude Delft); la programo estos festa. Ni kolektiĝos antaŭ stacio D.P. je la 9.45.
Ni kalkulas je ĉies veno!

ROTERDAMA S.A.T.-RONDO.

Vizitu nepre nian majan kunvenon, kiu okazos la *12an de majo*, Rusthoflaan 53. K-do C. Coppens parolados pri interesa kaj aktuala temo. Komenco je la 10a horo.

A'DAMA S.A.T. RONDO.

Perantino: H. Oudenhooven—Bishoff, Bestevaerstraat 127 III., Amsterdam-West.

A'damaj S.A.T.-anoj atentu!
La Zaanregiono invitas la Amsterdaman S.A.T.-rondon viziti S.A.T. kunvenon en Zaandam. *La 2an de junio*, matene je la 9a horo ni boate ekskursos al Zaandam. Pluraj komunikoj sekvos! Perantoj, bone atentu la apartan alvokon. sendotan al ĉiuj sekcioj!

EL LA ASOCIA ESTRARO.

Tuj post la Alkmara Kongreso la Estaro kunvenis. Ĉefa punkto de la tagordo estis la divido de la diversaj taskoj. Ĉi tio estis jene aranĝata:
Kdoj Veen, prezidanto, Kruit, sekretario, v. Haren, vic-sekretario, Pouli, kasisto, Koeman, vic-kasisto, Alings, redaktoro, de Vries, vic-redaktoro, Propagando kaj Gazetarservo, Prins, membro-administrado, Velthove, generalaj membroj.
Por la kontakto kun Esp. ĉe la Instruado zorgos kdo Kruit. Plie kdoj Veen kaj Kruit okupos sin pri la perantado inter nia Asocio kaj N.C.K.E. kaj due: inter nia movado kaj la L.E.A. Komitato.
Kdoj Veen, Kruit, Pouli kaj Faulhaber formos la Libro-Servo-komitaton, dume kdo Kroonder, kiu eksiĝis el la Estraro, deklaris sin preta resti en ĉi tiu komitato kiel komerca konsilanto. Cetere kdo Kruit ankoraŭ laboros en la kadro de la Ĝen. Kons. S.A.T. Dum la traktado de la tagordo la pasinta Alkmara Kongreso estis priparolata. La Estraro konkludis, ke ĉio estis bonege antaŭpreparita kaj ke ankaŭ meritas dankon kdo Bultemeyer, la kasisto de sekcio A'dam Va, kiu tiom bonege aranĝis ĉion koncerne niajn eksterlandajn gastojn.
Ĉi tiu kongreso postlasis impreson de internaciaj karaktero kaj interfratiĝo, pro kio ĝi longe restos en nia memoro kiel eksterordinara Kongreso, kiu forte instigis ĉiujn ĉeestintojn daŭrigi la laboron: disvastigi Esperanton. D.K.

JUBILEA DONACO.

La Amsterdama distrikto iniciatis monkolektadon okaze de la 35-jara ekzistado de nia organizo. Ke la sekcioj komprenis, ke mono necesas por nia laboro, pruvas suba listo da sekcioj kiuj jam sendis unumonatan sekcian kotizon po ano:
Amersfoort, Amsterdam I, III, V, VI, X, XIII, XV. XVII, Andijk, Apeldoorn, Arkel, Assendelft, Beverwijk, Bussum, Delft, Deventer, Dordrecht, Eindhoven, Enschede, 2e Exloërmond, Gent, Gouda, Groningen, Den Haag, Heerlerheide, Den Helder, Hoorn, Koog a. d. Zaan, Krimpen a. d. Lek, Leiden, Meppel, Middelburg, Nijmegen, Oostvoorne, Opheusden, Rotterdam IV, VI, VII, Schiedam, Sliedrecht, Utr cht, Vlaardingen, Winterswijk, Wijdenes, Wormeerveer, Zeist, Zierikzee, Zuilen, Zwolle, IJmuiden, 1 ĝenerala membro kaj du anonime.
Sekcioj kiuj ankoraŭ ne pagis, faru tion antaŭ la 25a de Majo al la kasisto de la Amsterdama distrikto: G. Kemper, L. de Colignystraat 29 I, Amsterdam-W.
En Junia L.E. aperos la lasta listo da pagintaj sekcioj.

KUL